



Bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2014 (202)

4. 12. 2014

Praga Esperanta monumento renovigita



Volontuloj de nia klubo kaj de la klubo E-mental' gviditaj de la pentristo Stanislav Krajiček la 23-an de novembro renovigis la Esperantan monumenton apud la Kongresa centro. Oni farbis la surskribojn per malhelverda koloro. Nun la teksto estas denove bone legebla kaj aspektas elegante. Oni ankaŭ ordigis la herbejon en la ĉirkaŭaĵo.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis!

Fotoj de la evento atingeblas en nia paĝo en Facebook:
www.facebook.com/bulteno.

La 18-an de decembro ekde la 17-a horo okazos en nia klubejo Antaŭkristnaska kunveno.

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	3
Intervjuo kun Josef Trojan (T. Bř.)	10
Miloš Urban pri Esperanto (J. Patera)	13
La romaa etno (V. Ludíková).....	14
Genealogio kaj genealog. produktoj (T.Bř.)...15	
Se mi eble ne revenus (J. Karen)	19
El poemoj de Eli Urbanová.....	21
Kuriozaĵoj	23

Klub esperantistů v Praze

bulteno.cs-retromusic.net

Schůzky v ulici Ve Smečkách 25
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

t.brichacek@seznam.cz

Koran dankon al Pavol Petřík kaj
Markus Beyer pro lingvaj korektoj.

OZNÁMENÍ VÝBORU

Členské příspěvky na rok 2015

Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové **členské příspěvky na rok 2015**. Výše příspěvku činí nadále **80 Kč**. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo pomocí přiložené složenky nebo bankovním převodem na účet č. 1445319/0800 (při bankovním převodu uveďte pokud možno svoje jméno).

Otázky ohledně příspěvků můžete směřovat na místopředsedu a pokladníka Jiřího Mišurce misuj@email.cz.

Předvánoční setkání v klubu

Ve čtvrtek **18. prosince** od 17 hod. proběhne v naší klubovně Ve Smečkách **25 předvánoční setkání**. Pochutnáme si na lahůdkách a nápojích, které si sami doneseme. Přijďte se pobavit a zhodnotit letošní rok.

Vánoční přání

Výbor přeje všem členům klubu i čtenářům Bultena krásný advent, šťastné a veselé Vánoce a mnoho úspěchů v roce 2015.

Chcete dostávat Bulteno jen elektronicky?

Jednotlivým členům a dalším čtenářům, kteří dostávají Bulteno v tištěné podobě, bychom chtěli nabídnout ke zvážení možnost, že by náš časopis dostávali jen elektronicky v zájmu úspory nákladů. Elektronické vydání Bultena si může každý snadno vytisknout. Čtenáři, kteří jsou ochotni takto podpořit klub, ať se ozvou na e-mailovou adresu t.brichacek@seznam.cz.

Ročenka pražských esperantistů 2014

Ke konci roku bude v elektronické podobě připravena ročenka o činnosti našeho klubu a obecně pražských esperantistů v roce 2014. Ročenka bude dostupná na internetových stránkách klubu.

Dotazy k ročence možno směřovat na adresu t.brichacek@seznam.cz.


Parko en la praga kvartalo Strašnice portos la nomon de Jiří Karen Jiří Patera



Jiří Karen (1920 – 2000) estis ĉeĥa kaj esperanta poeto. Kiel junulo li lernis Esperanton. Dum la dua mondmilito li devige laboris en Germanio; de tie devenas liaj korespondaĵoj el Germanio el la milita tempo. Post la milito lia amiko konvinkis lin, ke la lingvo Interlingua estas pli bona ol Esperanto kaj de tiam li okupiĝis pri tiu ĉi „moderna“ lingvo. Sed post dudek jaroj li konstatis, ke Interlingua tute ne progresas, dum en Esperanto ekzistas literaturo, gazetoj, diversaj aranĝoj, konferencoj, kongresoj kaj ekspozicioj, kaj tiam li revenis al la lingvo Esperanto.

Jiří Karen estas aŭtoro de 20 eldonitaj ĉeĥlingvaj poemoj, plue de 50 neeldonitaj – samizdataj – multobligitaj kajeroj kun poemoj kaj aliaj tekstoj, kaj kelkaj poemoj en la germana kaj Esperanto. La esperantaj poemoj estas tradukitaj de Rikardo Ŝulco, Jiří Kořínek kaj Jaroslav Mráz, du esperantaj poemoj „Eternaj revolvoj“ kaj „Kantoj de vaganto sur planedo Ĝoja Ĝojmalo“ estas liaj originalaĵoj.

La parkon, kiu portos lian nomon, ĉirkaŭas la strato Na Třebešíně. La nomon de Jiří Karen por la parko elektis la estraro de Prago 10.



Internacia Vesuviana Akademio honorigis geedzojn Bergr

Jiří Patera



La ĉeĥa poetino kaj verkistino Zdenka Bergrová (1923 – 2008) kaj ŝia edzo, la ilustristo, pentristo kaj skulptisto Věroslav Bergr (* 1928), estas amikoj de Esperanto. En Esperanto aperis kelkaj poemaroj de la poetino, ekz. „Oscilad’ de steloj“ kaj „Vortoj de la nokto“, tradukitaj de J. Mráz kaj M. Malovec, kaj „Kosmo sonoras per steloj“ kaj „Mi renkontas vortojn“, tradukitaj de J. Krolupper. Ŝiaj prozaj verkoj aperis en nia Bulteno samkiel la ilustraĵoj de ŝia edzo.

Ĉi-jare la Internacia Vesuviana Akademio en Napolo, Italio, atribuis al Z. Bergrová kaj V. Bergr la titolojn „Akademiano“, kio estas granda honorigo por ambaŭ ĉeĥaj artistoj kaj amikoj de Esperanto. Diplomon por meritoj atribuis al la poetino Zdenka Bergrová ankaŭ la Universala Akademio „Giosue Carducci“ en Ischia (Napolo).

Internacia simpozio Otokar Březina 2014

Jiří Patera

En la konstruaĵo de la Filozofia fakultato de Karola Universitato en Prago okazis la 19-an de septembro 2014 la **Internacia simpozio Otokar Březina 2014** okaze de la 85-a datreveno de la morto de elstara ĉeĥa poeto Otokar Březina (1868 – 1929), aŭtoro de ses poemaroj kaj de libroj de eseoj kaj korespondaĵoj. La poeto estis instruisto en la moravia urbo Jaroměřice nad Rokytinou kaj estis proponita por la Nobel-premio pri literaturo.

La Internacian simpozion aranĝis la Societo de Otokar Březina kunlabore kun la Instituto de la ĉeĥa literaturo kaj komparatistiko de la FF de KU en Prago kaj prelegis en ĝi ĉeĥaj kaj ankaŭ eksterlandaj fakuloj el Argentino, Bulgario, Rusio kaj Slovakio. Prelegis tie ankaŭ la esperantistoj Miroslav Malovec kaj Viktor Dvořák, kiuj prezentis la grandformatan poezian libron de Otokar Březina „Mistero de Doloro“ en la ĉeĥa kaj en Esperanto. En la libro ĉiu poemo troviĝas ankoraŭ en du aliaj lingvoj, entute en dudek lingvoj. La poemojn de O. Březina esperantigis Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr. Per tiu ĉi verko Esperanto fariĝis samranga al aliaj lingvoj en diverslingvaj poemlibroj de Otokar Březina, prezentitaj en la simpozio. La esperantan poemaron eldonis Societo de Otokar Březina, Jaroměřice nad Rokytinou (Muzeo de Otokar Březina) kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Svitavy (Muzeo de Esperanto).

Estas aldoninde, ke la Internacian simpozion subtenis ankaŭ la Nuklea elektrejo Dukovany, la Regiono Vysočina (Montetaro) kaj la urbo Jaroměřice nad Rokytnou.

Problemo kun la kunvenejo solvita

Kiel oni informis en la Bulteno n-ro 2/2014 en aprilo kaj majo nia klubo havis problemojn kun la kunvenejo en la strato Ve Smečkách 25. La kvartalestrejo de Prago 1 portempe malpermesis la uzadon de siaj kunvenejoj laŭdire pro tio, ke en unu el ili foje renkontiĝis iuj ekstremistoj. La prezidanto de nia klubo turnis sin perletere al la kvartalestro de Praha 1. La kvartalestro plenumis la peton kaj ekde la komenco de junio la klubo denove povas kunveni en la ejo.

La praga klubo en Facebook



Nia klubo havas nun sian paĝon en Facebook. Bonvolu viziti ĝin kaj aliĝi: www.facebook.com/bulteno. Vi povos komforte sekvi ĉiujn novaĵojn.

Aktualaj informoj estas nature ankaŭ en nia paĝaro: <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

Zajímavosti odjinud

Ze stránek www.esperanto.cz

Z Polska: 20.11.2014 oznámila profesorka Małgorzata Omilanowska, polská ministryně kultury a národního dědictví, že esperanto bylo zapsáno na seznam nehmotného kulturního dědictví Polska. Je to výsledek snahy polského senátora Edmunda Wittbrodta a Kazimierza Krzyżaka, člena polské nestátní neziskové organizace Pola Asocio Eŭropo – Demokratio – Esperanto (polská sekce politického hnutí Evropa – Demokracie – Esperanto za jazyková práva evropanů). Tento úspěch esperanta v Polsku dává možnost tomu, aby bylo esperanto zapsáno i na seznam světového nehmotného kulturního dědictví organizace UNESCO podobně jako je za Českou republiku zapsané například sokolnictví nebo verbuňk. Tato novinka samozřejmě neunikla zájmu polských médií, například bialystocké redakci deníku Gazeta.

Venontaj aranĝoj

Venontaj kunvenoj Venontaj kunvenoj Venontaj kunvenoj

Kunvenoj en decembro, januaro kaj februaro

DECEMBRO: la 4-an kaj la 18-an Prosinec: 4. 12. a 18.12.

JANUARO: la 15-an kaj la 29-an Leden 15.1. a 29.1.

FEBRUARO: la 12-an kaj la 26-an Únor 12.2. a 26.2.

Kunvenoj komenciĝas je la 17-a horo Začátek vřdy v 17 hod.

Programo de la kunvenoj estos prezentata en niaj interretaj paĝoj <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

La 15-an de decembro ekde la 18-a horo la klubo E-mental' organizas feston okaze de la **Zamenhofa tago** (detaloj malsupre)

La 18-an de decembro ekde la 17-a horo okazos en nia klubejo Ve Smečkách **Antaŭkristnaska kunveno**.

La 20-an de decembro E-mental kun slovakaj esperantistoj organizas **Grandan lokŝumadon en Bratislavo**. Estos renkontiĝo meze de Bratislavo kun vizito de antaŭkristnaska foiro, gustumado de slovakaj specialaĵoj "lokŝoj", kristnaska grogo... Promenado tra centro de la urbo. Kafumado, teumado, babilado en kafejo. Detaloj en <http://www.e-mental.cz/>.

La 31-an de decembro Tomáš Břicháček prezentos la **Jarlibron de pragaj geesperantistoj por la jaro 2014**.

Venu festi la Zamenhoftagon!

Vlasta Piřtíková

Venu festi la Zamenhoftagon!

Kiam? La 15-an de decembro 2014 je la 18-a horo

Kunvenloko estas en la restoracio Podskalská celnice na Výtoni je la 18-a horo.

En la restoracio ni restos ĝis la 19.30 kaj poste ni jam tradicie grimpos al Vyřhrad, kie ni vizitos la Esperanto-memorŝtonon kaj kie ni ankaŭ jam tradicie tostos.

Tiuj, kiuj pro diversaj kialoj ne povas iri kun ni de la restoracio, venu je la 20-a horo rekte al la monumento.

Bongustaĵoj kaj tostaĵoj estas bonvenaj!

Se vi planas veni, bonvolu sciigi nin, por ke ni sciu, kiom da lokoj en la restoracio rezervi.

Pasintaj aranĝoj

La 19-an de junio okazis en nia kunvenejo la **svinga vespero**. Tomáš Břicháček havis prelegon pri la ĉeĥa svinga dancmuziko de la 1930-aj kaj 1940-aj jaroj kun aŭskulto de la plej famaj „ŝlagroj“ kaj montraĵoj de tiutempaj muzikaj presitaj materialoj.

Ekde la 27-a ĝis la 29-a de junio 2014 okazis la tradicia E-mentala gastronomia aranĝo **Viando** – ĉi foje en Chotýčany.

La 9-an de aŭgusto 2014 okazis la **2-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando** (Zirkelstein+Kaiserkrone).

La 6-an de septembro 2014 okazis la **3-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando** (Brand).

La 25-an de septembro okazis en nia kunvenejo **prelego** de Jiří Galuška **pri lia vojaĝo en Israelon** dum la luktoj en la Gaza Sektoro.

La 9-an de oktobro okazis en nia kunvenejo **prelego** de Tomáš Břicháček dediĉita al la **geneologio kaj geneologiaj produktoj**.

La 23-an de oktobro okazis en nia kunvenejo **prelego** de Petr Chrdle pri la **fratoj Karel kaj Josef Čapek**.

Ekde la 9-a ĝis la 11-a de novembro okazis la **6-a Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo (BIERo)** en Poděbrady.

La 23-an de novembro volontuloj de nia klubo kaj de E-mental' gviditaj de la pentristo Stanislav Krajíček **renovigis la Esperantan monumenton apud la Kongresa centro**.

La 4-an de decembro okazis en nia kunvenejo **prelego** de Vlasta Piščíková **pri la hispana regiono Katalunio**.



Foto de la prelego de Jiří Galuška

Novaj eldonaĵoj de KAVA-PECH

Petr Chrdle

La eldonejo KAVA-PECH aperigis en la pasintaj 12 monatoj plurajn librojn en Esperanto, kiujn mi volonte prezentas al la legantoj de Bulteno.

Komence mi menciuj reldonojn de jam elĉerpitaj libroj: Unue „R.U.R.“ de Karel Čapek kun ilustraĵoj de Mirka Tomečková, envicigita en la serion de UEA „Oriento-Okcidento“. Ĝi verŝajne rapide elĉerpiĝis ankaŭ pro la plurfoja sukcesa prezentado de la dramo „R.U.R. -Terura sonĝo“ en plenumo de la studenta ensemblo DoMa el Svítavy kompletigita de du spertaj esperantistoj Jan Fidel Řepa kaj Petro Chrdle. Tial en la duan eldonon estas aldonita ĉapitro „R.U.R. sursceneje“, kiu priskribas tion, kaj montras kelkajn fotojn el la prezentado de la dramo dum la 98-a UK en islanda Rejkjaviko.




Alia reldono estas la 3-a kompletigita eldono de „Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj“ fare de Petro Chrdle. Ĝi resumas la spertojn de la aŭtoro precipe sur la kampo de eldonado de libroj kaj turismo, kie li uzis Esperanton samrajte kun la ceteraj laborlingvoj (la ĉeĥa, angla kaj germana), sed ankaŭ sur la kampo de internacia komerco, en kiun li lasis sin altiri de esperantistoj sen antaŭaj spertoj nacinivele, tial tiuj finiĝis malsukcese – kion la aŭtoro sincere konfesas kun analizo de la kaŭzoj por averti la postsekvantojn.

Rapide populariĝis kaj relative baldaŭ elĉerpiĝis la movada legolibro en simpla Esperanto „Bonvenon en nia mondo“ de Bent Jensenius. La

nun eldonita dua eldono estas aktualigita kaj kompletigita. Tial ĝi koncize, sed fidinde respegulas la aktualan Esperanto-movadon en la mondo. La Aŭtoro de la fama perfektiga legolibro „Vojaĝo en Esperanto-lando“ Boris Kolker skribas en la recenzo de „Bonvenon“: „Tiu ĉi libro estas trezoro por komencintoj kaj progresantoj. Ĝi estas uzebla kiel perfektiga lernolibro de Esperanto kaj kiel legolibro pri la movado. Kaj ĝi estas tre fidinda...“

Listigante la reldonojn mi ne rajtas forgesi la duan eldonon de *Esperanto přimou metodou* de Stano Marček en traduko de Max Kašparů, kiu estas interesa precipe pro tio, ke ĝi aperis jam en 33 lingvoj. Tial eĉ komencanto povas ekkorespondadi kun alilingvaj komencantoj, ĉar estas garantio, ke ilia vortprovizo, kvankam limigita, enhavas la samajn vortojn kaj do oni jam povas interkompreniĝi.

Aperis ankaŭ unu novaĵo, nome „Konciza historio de Kristanismo“ de Gerrit Berveling. La interesan fonon de tiu eldonaĵo mi priskribis en Starto 2/2014, do mi ne ripetu ĝin. Sed mi almenaŭ menciuj, ke temas pri malampleksa verko pri tiu ampleksa temo, kiu tamen priskribas koncize en mallongaj ĉapitroj preskaŭ ĉiujn gravajn epokojn en la evoluo de kristanismo.



Mi menciuj ankaŭ kelkajn ĉefajn novaĵojn: *Maŝkaráda kolem smrti* de Tivadar Soros estis priskribita en Bulteno 1/2014. Sed mi aldonu, ke estas preparata ankaŭ alia verko de la sama aŭtoro, ankaŭ tradukita el Esperanto fare de Jindřiška Drahotová kaj editorita de Humphrey Tonkin, *Robinsoni na Sibíři*. Temos denove pri memuaro. Ĉi-foje ĝi priskribas la aventuran fuĝon de la aŭtoro el siberia prizono post la unua mondmilito. La eldonejo jam havas la kopirajton de la kopirajt-portanto George Soros kaj la verko devus aperi en la unua kvarono de 2015.

Fine de la pasinta jaro aperis ankaŭ la ĉefa traduko de la sukcesa Esperanta privikinga libro de Leif Nordenstorm kun ilustraĵoj de Pavel Rak

„Arne, la ĉefido“ (modestforme eldonita de KAVA-PECH, jam en du eldonoj). Ĝin ĉefigis Oldřich Arnošt Fischer kaj en la ĉefa ĝi aperis kiel *Arne, syn náčelníka* en pli luksa aspekto kaj kun koloraj ilustraĵoj.

La lasta eldonita libro estas *Spalte svoje úspory* verkita de Jiří Hěl. Ĝi havas ŝajne nenion similan kun Esperanto. Temas pri populare klarigita analizo, laŭ mi trafa, ke la plejparton de malbonaj aferoj sur nia tergloba kaŭzas la ekzisto de mono - ĉefe ekde la tempo, kiam ĝi ne plu servas nur por helpi interŝanĝon de varoj (tio estas en ordo), sed ĝi mem fariĝis varo. Sed la proponata solvo en la finaj ĉapitroj, kiel liberiĝi de la regado de mono, ŝajnas al mi ne nur nerealigebla, sed eĉ naiva. Tial mi tuj volis malakcepti la eldonon de la libro, sed antaŭ ol mi sendis tiun decidon al la aŭtoro mi ekkomprenis, ke li vere estas laŭ mi naivulo, sed, ke simila naivulo estas mi en la okuloj de aliaj pro mia supozo, ke povus ĉiuj homoj en la mondo lerni krom sia gepatra lingvo regulan neŭtralan internacian lingvon kaj per tio povus paroli ĉiu kun ĉiu. Mi do skribis al la aŭtoro, ke mi pretas eldoni la libron kun kondiĉo, ke li konsentos envicigi mian postparolon en la menciita senco. Rezulto: li konsentis kaj mi eldonis ĝin – kaj la legantoj povas en la postparolo ekscii ion pri Esperanto.

El la preparataj libroj por la eldono mi menciuj la 4-an eldonon de *Esperanto za tři měsíce* de Petro Chrdle kaj Stanislava Chrdlová. Ĝi enhavos gravan novaĵon. Ĉar la ekzercaro en la reto montriĝis malkonvena (momente pro teknikaj kialoj ĉe la reprovizanto ĝi ne funkcias kaj ne plu funkcios) ĝi estos kompletigita per kompaktdisko, kiu enhavos ne nur ekzercojn al ĉiuj lecionoj kaj laŭtlegatajn artikolojn el la legolibro (fina parto de la lernolibro), sed ankaŭ aliajn realaĵojn. Ĝi estos integra parto de la nova eldono, tamen ankaŭ ofertata memstare, por ke ankaŭ la posedantoj de la antaŭaj eldonoj povu ĝin aĉeti sen la devo aĉeti novan lernolibron. Momente ĝi ankoraŭ ne estas redakte finita. Mi tamen esperas, ke ĝi aperos iam en la dua kvarono de 2015.

Pli da informoj pri la menciitaj libroj kaj ankaŭ pri la ceteraj eldonaĵoj de KAVA-PECH vi trovos ĉe www.kava-pech.cz / chrdle@kava-pech.cz

INTERVJUO

La nestoro de pragaj esperantistoj retrospektas

Tomáš Břicháček



En februaro 2014 Inĝ. Josef Trojan post multaj jaroj forlasis la estraron de nia klubo. Li estis nia prezidanto preskaŭ naŭ jarojn (2003-2010, 2012-2014) kaj estrarano eĉ pli longe.

La nestoro de pragaj geesperantistoj membriĝis antaŭ pli ol kvindek jaroj en la epoko de la fama prezidanto Ŝustr. Li restas aktivulo kaj ofta partoprenanto de klubaj aranĝoj. Nun li bonvole akceptis inviton de la Bulteno por fari intervjuon por ni.

Ĉi-tiu kontribuaĵo malfermas planitan serion de interparoloj kun meritplenaj pragaj geesperantistoj.

Inĝ. Josef Trojan (* 1931)

Origine ŝumavano el vilaĝeto proksime de Stachy. Post la dua mondmilito la sorto alportis lin al Tachov, Pilseno, Mariánské Lázně kaj fine en la malfruaj 50-aj jaroj li ankris en Prago. Li finstudis la fakon *inĝenieraj konstruoj* en la Ĉeĥa Alta Tehnika Lernejo (ČVUT). Kiel konstrua inĝeniero li laboris en diversaj ŝtataj entreprenoj, kiuj sinsekve reorganiziĝis kaj ŝanĝis nomojn. En la komenco de la 90-aj jaroj, jam kiel pensiulo li iĝis memstara aŭtorizita specialisto pri statiko. Li estis prezidanto de Esperantista klubo en Praha ekde la 27-a de marto 2003 ĝis la 18-a de marto 2010 kaj ekde la 4-a de oktobro 2012 ĝis la 27-a de februaro 2014.

Ni renkontiĝis la 23-an de oktobro 2014 en la Teatra restoracio en la strato Ve Smečkách kontraŭ nia kluba kunvenejo. Parolante kaj trinkante kapuĉinon ni pasigis unu agrablan horon.

Kiam kaj kiel vi iĝis esperantisto?

Estis post la milito ĉirkaŭ la jaro 1947, kiam mi studis mezlernejon – tehnikumon – en Pilseno. Esperanton sugestis al mi mia bona amiko el infanaj jaroj – kun kiu mi parenteze interrilatas ĝis nun – kaj kiu estis granda entuziasmulo por Esperanto. La pilsena esperantista klubo tiam organizis kurson, do mi alskribiĝis. Partoprenis proksimume tridek homoj – tiam Esperanto estis populara.

Mi trapasis tiun kurson kaj mi ankaŭ aĉetis lernolibron de sinjorino Šupichová, kie estis tuta gramatiko kaj malantaŭe riĉa vortaro, kiun mi ellernis. Baldaŭ, eble post unu jaro estis esperantista kongreso en Brno, kie mi jam bone interkompreniĝis.

Do vi estis unue klubano en Pilseno...

Jes. Ĝuste en la klubo, kiu organizis tiun kurson. Tio estis interesa periodo. Post la februaro 1948 baldaŭ ekestis iuj politikaj problemoj kun la nova reĝimo, sed sinjoro Burda, kluba aktivulo kaj samtempe komunisto, ĉiam solvis ilin.

Finstudinte la mezlernejon mi laboris unue en unu lignomastruma entrepreno en Tachov. Kaj tie mi organizis kurson de Esperanto por proksimume dudek homoj. Ni varbis lernontojn ankaŭ en la ĉefa placo eksponante la poŝtkartojn de niaj eksterlandaj korespondantoj por montri kiel Esperanto ebligas komuniki kun la tuta mondo – mi ĝis nun havas hejme multegajn poŝtkartojn. Sed tio ne plaĉis al la loka polico, kiu ordonis al ni forigi ĉion. Komprenu, ĉiuj rilatoj kun eksterlando estis suspektaj tiatempe.

Kaj kiam vi venis en Pragon kaj iĝis loka aktivulo?

Mi venis en Pragon iam ĉirkaŭ en la dua duono de la 50-aj jaroj por studi en altlernejo. Mi studis la fakon *inĝenieraj konstruoj* en la Ĉeĥa Alta Tehnika Lernejo. Poste mi jam restis en Prago kaj edziĝis ĉi tie.

Jam dum miaj studoj mi komencis viziti la pragan esperantistan klubon. Tiam la prezidanto estis la legenda Jaroslav Šustr. Li estis tre simpatia, afabla homo, kiu strebis helpi al aliaj. Ankoraŭ dum lia epoko mi iĝis delegito de UEA, kiu mi estas ĝis nun.

La tempo pasis kaj la klubo transloĝiĝis multfoje. Ni estis en la strato Revoluční, en Smíchov, en Malnova Urbo... Ve Smečkách oni ankris en la naŭdekaj jaroj.

Ĉu vi multe vojaĝis kun Esperanto?

Jes multe. Mi partoprenis en kelkaj universalaj kongresoj de UEA. Mi estis en Varsovio, Brajtono, Rejkjaviko, Hanojo... Mi ĉefe ŝatis la kongreson en Brajtono, kien oni organizis grandan ĉeĥan karavanon. Tio estis ankoraŭ dum la socialismo kun aŭtobuso de Čedok.

Esperanto faciligis al mi vojaĝi ankaŭ alimaniere. Mi povis ĉiam kalkuli pri esperantistoj, kiuj helpis al mi kaj ĉe kiuj mi povis tranokti. Tiel mi estis ekzemple en Usono aŭ tri monatojn en Suda Ameriko – en Argentino, Ĉilio, Bolivio, en Brazilo laŭlonge de Amazona rivero. Miaj vojaĝoj ofte rilatis kun mia granda hobbio, kiu estas la mineralogio. Mi aĉetis ŝtonojn, kolektis trilobitojn, ktp.

Mi supozas, ke vi partoprenis la UK-on en Prago en 1996? Pri kio vi memoras?

Nature. Tio estis bonega kongreso. Ĉiuj el nia klubo strebis helpi. Mi mem havis diversajn taskojn. Mi asistis al la eksterlandaj kongresanoj en la hotelo, kie loĝis plimulto da ili.

Kaj kiel vi iĝis prezidanto de nia klubo?

Mi transprenis la funkcion post Jiří Patera en la jaro 2003, kiam li transloĝiĝis en Most. Ne estis tiam aliaj aspirantoj. Ne estis alia solvo.

Post kelkaj jaroj Patera denove iĝis prezidanto por mallonga periodo kaj poste denove revenis mi.

Kaj kiuj estas viaj plej ŝatataj rememoroj el la prezidantaj jaroj?

Estis multaj belaj prelegoj, kunvenoj, ekskursoj. Ĉiam estis io interesa. Mia hobbio estas ŝtonoj – mineralogio, kiel mi jam diris. Mi organizis plurajn aranĝojn pri tiu temo kaj ankaŭ kun teĥnikaj temoj.

Vi loĝas en Prago 6 proksime de la lasta loĝloko de Eli Urbanová. Ĉu vi havas iujn interesajn rememorojn pri ŝi?

Do, jes, ni ofte renkontiĝis tie proksime en la magazenoj ktp.

Sinjoro prezidanto, koran dankon pro via tempo kaj viaj respondoj.

Historia fenestreto Historia fenestreto Historia fenestreto

Prezidantoj de la praga klubo ekde la jaro 1989

1989-02-20 Zbyněk Khail

1991-02-18 Květa Hubnová (nun Krajíčková)

1994-02-21 Jiří Patera

2003-03-27 Josef Trojan

2010-03-18 Jiří Patera

2012-10-04 Josef Trojan

2014-02-27 Tomáš Břicháček

Miloš Urban pri Esperanto

Jiří Patera

La elstara nuntempa ĉeĥa verkisto Miloš Urban aperigis en la ĵurnalo MFDnes ampleksan artikolon „Interparoloj el koktelejo aŭ kial enkonduki Esperanton en EU“. Li priskribis sian diskutadon kun du amikoj, el kiuj unu estas eŭroskeptikulo, sed la alia estas entuziasma poreŭropano. Kaj li esprimis sian opinion: „Mi ne opinias, ke la komuna mono estas la sola grava afero. La unuiĝo de imposto-sistemo estus ankaŭ bona. Pli substancaj estas por mi la malfermitaj landlimoj kaj ankaŭ io, kion eĉ la plej grandaj Poreŭropanoj ne kuraĝas esprimi laŭte, kvankam ili pri tio sekrete revas.“ „Kaj kio ĝi estas?“ mi volis scii. „Mi ne estas politikisto, poentojn ĉe balotantoj mi ne perdos, do aŭskultu: la granda Rusujo kaj ties Eŭrazio havas la rusan lingvon, la grandega Ĉinio havas la ĉinan lingvon, la civitanoj de Usono parolas kun multaj akcentoj, sed per unusola lingvo, en Suda Ameriko tio estas la hispana kaj portugala lingvoj. Komunan lingvon ni bezonas ankaŭ por Eŭropo. Ĝi devas anstataŭigi neniun nacian lingvon, sed ĝi devas faciligi la komunikadon – ĝi devas esti simpla kaj devas la eŭropajn lingvojn ankaŭ iom memori. Ne estas necese tian lingvon elpensi, ĝi estas ĉi tie jam pli ol cent jarojn; ĝia nomo estas Esperanto, ĝi estas genie facila kaj subtenas ĝin Unesko.

Eble estas karakterize, ke en sia tempo ties propagandistoj kaj instruistoj estis persekutataj de la cara polico, poste de la gestapo, pli poste de la sekretaj policoj de landoj de la sovetia imperio. Mi aŭdis, ke Esperanton iufoje klopodis akceptigi Lenin, sed la ideo ne akceptiĝis; bedaŭrinde ĝi estis unu el la malmultaj bonaj, efektive pozitivaj tezoj de Lenin.

Enkonduki Esperanton estos nenio facila, tion mi konscias...

Certe la britoj pri sia *lingua franca* ne rezignos, sed ili pli aŭ malpli frue tamen el la Unio ekŝiĝos, ili ĉiam estis sur insuloj kaj tie ili ankaŭ restos.

Por la francoj estas grave, ĝis kiom ili estos kapablaj agnoski, ke ilia franca lingvo, koncerne la globalajn lingvojn, estas lingvo aparte provinca. Apud ĝi Esperanto oportune havus lokon samkiel apud la hispana, germana aŭ itala, pri pli malgrandaj lingvoj eĉ ne parolante. Ĉiu svedo scipovas svede kaj angle, kial ĉiu ĉeĥo ne povus scipovi paralele la ĉeĥan kaj Esperanton? Ĉeĥe hejme, eksterdome per Esperanto...

Kompreneble estos grava la klerigo; kampanjon celatan al homoj pli ol kvindekjaraj mi imagas iel tiel: ĉeĥoj, lernu Esperanton, per la plialtigita cerbo-aktiveco vi malfruigos la Alzheimer-malsanon.

Plie vi brile interkompreniĝos, kiam vi forveturos eksterlanden por libertempoj kaj vi bezonos iri al necesejo: Pardonu, kie estas la banejo?

Esperanto estas ideala komuna lingvo de prosperontaj Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo.

Ĝis revido!“

La verkisto Miloš Urban (*1967) naskiĝis en Sokolov, parton de sia infanaĝo li pasigis en la ĉeĥoslovaka ambasado en Londono, kie laboris liaj gepatroj, poste en Prago li studis la modernan filologion, nome la anglistikon kaj nordistikon en la Filozofia fakultato de Karola Universitato, poste li frekventis unujaran stipendian studadon en New College en Oksfordo kaj ekde tiam li laboras kiel eldoneja redaktoro en Prago. Li komencis traduki el la angla, en 1998 aperis lia unua romano „Lasta punkto post la Manuskriptoj“, sekvis la romano „Seppreĝej-ejo“, kiu estis tradukita en 13 lingvojn, liaj postaj romanoj estis „Nikso, La rememoroj de parlamenta deputito, La ombro de katedralo, Mikaela, La lingvo de Santini, La kampo kaj palisaro, Mortaj bubinoj, Lordo Murdo, Boletus arkanus, Praga Piccola, Ŝi venis el maro“.

Al s-anino Jindřiška Drahotová li sciigis, ke li nun verkas novan romanon, kiu havos esperantan titolon „Urbo Kune“, eĉ se la romano tute ne estas pri Esperanto.

La verkisto deziras ĉion plej bonan al esperantistoj kaj ankaŭ al la simpatiantoj de Esperanto.

La romaa etno

Věra Ludíková

La romaan etnon mi perceptas kiel certan ekzotikaĵon, kiun la realisme rezonanta homo unuavide ne komprenas. Mi perceptas ilin kiel intuiciajn homojn pridonacitajn per profeta talento kaj iliaj virinoj memorigas al mi la Tahitianinojn de la pentristo Gauguin, ornamitajn per floroj. Iliaj kantoj ne havas lokon en la notliniaro, sed la fingroj sur kordoj kaj la pasiaj voĉoj alparolas la koron rekte. Ĝi estas la spiro de alia tempo. Ili ne militas, ne aĉetas kastelojn, kaj tamen ili havas siajn ciganajn baronojn.

Kiam estiĝis la problemo pri azilpetoj por Kanado kaj Anglio, la romaa problemaro atingis aliajn dimensiojn. Ĉu ili fartis ĉi tie vere tiel malbone? Iam – tiam aperis fragmentoj de informoj en amaskomunikiloj. La romaoj foriris el Hindujo nur longe post la popolmigrado kaj estas versimile, ke ili trovis okupitajn teritoriojn. La romaa etno nombranta dek milionojn da homoj – laŭdire tiom ĝi estas granda – bezonus sufiĉe grandan terpecon, kiun ili ne havas, tial ili migras en malgrandaj grupoj. Ili al kutimiĝis vivi apud setlantaj homoj kaj la vivospacojn por si ne konkeri.

Ili devis havi grandan kvanton da memfido, kondukanta al la fido, ke vintrojn ili transatendos sen provizoj, sen devosento semi kaj serĉi por siaj gregoj novajn paŝtejojn, kiel ilin serĉas la paŝtistoj; verŝajne ili kredis, ke ilin prizorgos la ĉiela Patro. Iliaj tradiciaj metioj, la forĝista, kaldronista kaj korbofarista, estis destinitaj al pli vasta hom-komunumo. Per vergaĵo oni ne vestos sin, per kaldroneto oni ne satigos sin, se oni vivus nur apartigite. Estis kutime renkontadi veturilojn kovritajn per kovrotuko kun hundeto alligita post la veturilo. Al nomadoj anstataŭ kovrotukoj la vivo faciliĝis per ruldomoj.

Estas romantike post vekiĝo per nuda piedo treti herbon, dum vesperiĝo sidi sub steloj kaj nostalgii, kanti pri pasio de junaj belegaj homoj. Mi ne konas la fabelojn, kiujn la romaaj panjoj rakontas al siaj nigrokulaj infanoj, eĉ se tiaj fabelkolektoj jam aperis. Sed por ili la fabeloj transdaŭras ĉefe en la voĉa tradicio, ĉar pri romaoj estas konate, ke ili malmulte legas.

Homoj kaj objektoj fluas preter ni, sen tio, ke ni okupiĝas pri ili, sed nian intereson ili kapablas subite vekti. Spite al tio, ke la romaoj estis perforte enigita en la kompaktan socialistan socion, neniuj atentis pri tio, kiel tio estis por ili malfacila. Malfacile ili alkiutimiĝadis vivi sen fajrujo, ili ruinigis loĝejojn, ili laboris ĉefe pro tio, ke nelaboremuloj kaj parazitaj finiĝis en malliberejo – kaj ĉion ĉi oni konsideris normala.

Almenaŭ parte ni povus kompreni ilian amarecon, ke ie ili ne estas bonvenaj, kaj eĉ ne en lasos ilin tien. Antaŭ ĉio tiuj, kiuj travivis la komunistan diskriminacion, kiam iliaj infanoj ne havis ŝancon studi, ofte eĉ ne en mezlernejoj, eĉ se ili ne kulpis kontraŭ la tiama socio, povus ilin kompreni. Dividi la socion al homoj ĝustaj kaj malĝustaj ne eblas toleri, kiam la dividilo mem estas fiksita ekde la fundamento malbone, nome per la klasa aŭ rasa malamo.

La paradoksoj transvivas ĝis nun. Oni prijuĝas, kiu estas kaj kiu ne estas bona, kvazaŭ validus, ke dum ŝtelemo aŭ grandŝtelado la ŝtelmatadoro lasas sin kapti ĉe la freŝa faro, aŭ glate li senpune pasas tra ĉio en poluritaj ŝuoj.

Kiam oni komencas pri io interesiĝi, la informoj kvazaŭ venas mem. Mi legis ekzemple pri tio, kiel la romaan problemon solvis la brita registaro en la sesdekaj, okdekaj jaroj de la 20-a jarcento kaj pli poste, ke ĝi permesis la migradon, civitoj havis devon limfiksi al romaoj la terenon por tendumi, sed tiu ĉi avantaĝo poiome malgrandiĝis al 28 tagoj. En Anglio romaaj infanoj havas laŭokaze migran instruiston – la malklereco ja kunportas pli malbonan okupitecon kaj senlaborecon. Hodiaŭ romaoj estas ĉi tie kaj morgaŭ aliloke, je terpeco for. Por ni tio estas malfacile komprenebla, ni enhavas en ni pli multe da stabileco kaj ni serĉas certecojn.

La romaa fiereco estas malgravigata kaj la ribeleman liberecon kunigitan kun malkomforto ni ne komprenas. Al homo oni ne devus forpreni la eblecon estimi sin mem. Al kia pasinteco ili aliĝas, al kiu ili fidus, pri kio ili fieras? Ni demandu ilin.

(Esperantigis Jiří Patera)



Genealogio kaj geneologiaj produktoj

Tomáš Břicháček

Genealogio estas ĉarma scienco kaj nobla hobbio, kiu malfermas antaŭ vi sekretojn de la pasinteco, kiu ebligas al vi malkovri la sortojn de viaj antaŭuloj kaj lerni el ili, kiu ofertas al vi alian perspektivon de la vivo metante ĝin en pli vastan kuntekston, en kiu vi povas eksenti vin kiel heredanto de la tradicio de via gento, kiel tenanto de ĝia stafeto kaj (kun)kreanto de ĝia estonteco.

En mia mallonga artikolo mi ne parolos pri genealogio ĝenerale kaj teorie, sed mi volus doni al vi praktikajn konsilojn, unue kion fari por kolekti kiom eble plej multe da informoj kaj poste kiel utiligi ilin farante allogajn geneologiajn produktojn.

Esploro

La esploro de la familia historio devus komenci „hejme“ ĉe la fontoj, kiuj tuj disponeblas. Ju pli da inicialaj informoj vi havos des pli facila estos la „ekstera“ investigo. Antaŭ ĉio parolu aŭ korespondu kun la memoruloj kaj notu ĉion interesan. Esploru ĉu ekzistas traktaĵoj pri la familia historio jam skribitaj de viaj antaŭantoj. Fine elserĉu ĉiujn personajn atestojn (baptoatestojn aŭ naskiĝatestojn, geedziĝatestojn, mortatestojn), diplomojn, leterojn, laborajn legitimilojn, aliajn dokumentojn, honorigojn, medalojn, fotografiojn, tombajn enskribojn ktp.

Koncerne la „eksteran“ esploron, la elirpunkto estas nature la matrikuloj, kiuj estas la ĉefaj fontoj por trovi la bazajn viveventojn de la personoj. Ekzistas tri tipoj de matrikuloj: matrikuloj de naskiĝoj, matrikuloj de geedziĝoj kaj matrikuloj de mortintoj.

Publike atingeblaj estas tielnomataj „mortaj“ matrikuloj. Ĉe la matrikuloj de naskiĝoj, tio estas tiuj, kies lasta enskribo estas almenaŭ 100-jaraĝa, ĉe la matrikuloj de geedziĝoj kaj de mortintoj tio estas tiuj, kies lasta enskribo estas almenaŭ 75-jaraĝa. Tiuj „mortaj“ matrikuloj estas konservitaj en 7 regionaj arĥivoj (en Prago, Brno, Pilseno, Opava, Litoměřice, Třeboň, Zámrsk) kaj en la urba arĥivo de Prago. Multaj matrikuloj estas jam ciferecigitaj kaj atingeblaj interrete, do el via hejmo. Sed por povi trarigardi la ceterajn vi devas viziti la arĥivojn kaj pruntepreni la matrikulojn sidante en iliaj studĉambroj.

Katolikaj matrikuloj estas ordigitaj laŭ paroĥoj – do vi devas scii, en kiu paroĥo troviĝas la loko de la evento. Koncerne la geedziĝo estas utile scii, ke la nupto normale okazis en la paroĥo de la fianĉino.

Por via pli bona orientado en la matrikuloj estas helpaj la indeksoj. Tio estas listoj de familiaj nomoj de la personoj kiujn koncernas la enskriboj en la matrikulo en alfabetaj kaj ĥronologia ordo.

El la matrikulaj enskriboj oni ekscias ne nur la datojn de la tri viveventoj sed ankaŭ multajn aliajn informojn. Ĉe la naskiĝo vi ekscios ankaŭ la naskiĝdomon, nomojn de la gepatroj, geavoj kaj baptoĝepatroj kaj kutime ankaŭ iliajn profesiojn kaj loĝdomojn. Ĉe la geedziĝo estas krom alie la aĝo de ambaŭ gefianĉoj, iliaj loĝdomoj, nomoj de la gepatroj, geavoj kaj geatestantoj kaj

kutime ankaŭ iliaj profesioj kaj loĝdomoj. En la matrikuloj de mortintoj estas kutime interalie la aĝo kaj profesio de la mortinto kaj ofte ankaŭ la kaŭzo de la morto.

Koncerne la loĝlokon iam disponeblas ankaŭ aliaj fontoj. En iuj paroĥoj aŭ komunumoj ekzistis en iuj periodoj listoj de loĝantaro. Tiuj listoj estas konservitaj en distriktaj arĥivoj kaj en Prago en la urba arĥivo. En Prago oni ciferecigis tielnomatajn anoncojn de loĝantoj (pobytové přihlášky / konskripce) el la jaroj 1850-1914. Ili estas atingeblaj en <http://digi.nacr.cz/prihlasky2/>.

Alia grava afero de la familia historio estas certe la nemovebla havaĵo. La plej bona fonto de informoj estas la grundlibroj (*pozemkové knihy*) – antaŭantoj de nuna katastro – kiuj estas konservitaj ĉe la distriktaj administrejoj de katastro. Vi povas mendi elskribojn de la grundlibroj koncerne la konkreta nemoveblaĵo. Vi ekscios la nomojn de la posedantoj, kiel ili ŝanĝiĝis en tempo. Vi povas ankaŭ mendi kopiaĵojn de la rilataj dokumentoj kiel ekzemple la kontraktoj ktp. Krom tio en la paĝaro <http://archivnimapy.cuzk.cz/> estas malnovaj mapoj de la tuta lando, kie vi povas vidi ankaŭ detalojn de nemoveblaĵoj. Interesaj estas ĉefe tielnomataj *císařské otisky*.

Ĉe la viroj alia ĉapitro estas la milita (soldata) kariero. La bazaj fontoj estas konservitaj en la Milita Centra Arĥivo (Vojenský ústřední archiv, www.vuapraha.cz). Tie vi povas studi ĉefe la soldatan personan dokumentaron, kiu nomiĝas *kmenový list*. Vi ekscios ekzemple ekde kiam ĝis kiam la soldato estis en aktiva militservo, en kiu trupo li servis, kiujn ekzercojn li havis post la aktiva militservo, kiam finiĝis lia soldata kariero. Krom tio interrete estas atingeblaj datumbazoj de legianoj el la unua mondmilito, de la soldatoj batalantaj en eksterlando dum la dua mondmilito kaj aliaj.

Por pli ambiciemaj genealogoj ekzistas multaj aliaj fontoj por akiri aliajn informojn pri la vivo de niaj antaŭuloj, ekzemple lokaj kronikoj kaj dokumentaroj de variaj asocioj, kiuj normale estas konservitaj en distriktaj arĥivoj. Notu, ke la katalogo de ĉiuj arĥivoj en nia respubliko atingeblas en <http://aplikace.mvcr.cz/archivni-fondy-cr/default.aspx>. Lokaj kronikoj iam estas atingeblaj interrete.



Geneologiaj produktoj

La plej kutima kaj plej facila geneologia produkto estas la **familia arbo**. Ĉiuj konas ĝin. Ne estas necese klarigi ion. Mi nur rimarkus, ke ekzistas variaj komputilaj programoj, kiuj faciligas ĝian elfaradon. Mi povas rekomendi la programon My Heritage, kies baza versio estas elŝutebla senpage interrete.

Pli ambicema projekto estas la **familia kroniko** – libro, kiu parolas pri la familia historio. Detalajn instrukciojn kiel fari la kronikon vi trovos ĉeĉe en mia blogo en: <http://brichacek.blog.idnes.cz/c/390279/Rodopisne-namety-3-kronika.html>.

Alia produkto, kiu povas esti bona donaco por via vasta familio estas **kalendaro**, kiu rememorigas gravajn familiajn eventojn (ĉefe naskiĝo, nupto, morto) de viaj parencoj. Detalajn instrukciojn kiel fari la kalendaron vi trovos en: <http://brichacek.blog.idnes.cz/c/389356/Rodopisne-namety-2-kalendar.html>.

Interesa sed ege malfacila produkto estas **dokumenta filmo**. Detalajn instrukciojn kiel fari tiun filmon vi trovos ĉeĉe en mia blogo en: <http://brichacek.blog.idnes.cz/c/389260/Rodopisne-namety-1-jak-natocit-vlastni-dokumentarni-film.html>.

Ŝtelitaj infanoj en Norvegio

Tomáš Břicháček



Se ni jam parolas pri geneologio kaj familiaj aferoj, mi volus atentigi ĉiujn pri la terura kazo de sinjorino **Eva Michaláková**, kiu lukta kun la norvegaj institucioj por siaj du filoj Denis kaj David, kiuj estis deprenitaj de la gepatroj.

Vizitu la interretan paĝaron www.kdejemojedite.cz, kie vi ekscios ĉiujn detalojn.

En Facebook sekvu la grupon **Česko, vraťme děti rodičům**:
<https://cs-cz.facebook.com/CeskoVratmeDetiRodicum>.

Se mi eble ne revenus...

Jiří Karen¹

La 15-an de aŭgusto 1943 (el taglibro)

Dum reveturo mi denove haltis ĉe Věra. Ŝi havas febron, sputas sangon. Ŝi estas pala kiel morto. Mi konsolas ŝin, sed tio estas nuraj vortoj. Ŝiaj okuloj min petas, Johano, mi petas vin, silentu, per nenio vi kapablas kvietigi miajn timojn kaj dolorojn. Ŝi kuŝas ĉi tie jam kvar monatojn. Kaj timas la morton. Ŝi ne devas tion diri, mi sentas tion, vidas. Jes, fratino, vi timas la morton, kiel timas ĝin mi, kiam eksonas sirenoj. Nenion mi povas fari kaj tial estas sensignife ion diri. Ŝi dankas al mi por leteroj, mi skribu, ŝi tre petas. Venis kuracisto, ŝi ricevis injektaĵon. Ŝi ekdormis. Ĉiam mi vidas la vizaĝon plenan de angoro kaj malĝojego. Mi sentas la glaci-malvarman manon en la mia. Ankaŭ la alian, kiu spasmece teniĝas ĉe litflankaĵo. Kaj tamen nur mi provas diri ion mirigan. Ŝi aŭskultas, dampas tuson, sed poste ŝi mallaŭtete kaj peteme diras al mi: Johano, foriru, mi estas laca. Kaj ne koleru. Mi difektis vian libertempon, sed mi ne povas.

La vizito finiĝas. Ŝi penas mansigni al mi, ekridi. Dankon por la peno, fratino. Ankaŭ vi mortas al mi. Ĉio mia mortas, foriras, disfalas, nenion oni povas fidi ĉi tie, nenio estas fortika kaj certa.

Mi observas ŝian ĉambron. Kiom da belaj libroj estas ĉi tie. Grandaj, malgrandaj, binditaj, kun oraj margenoj, libroj kun acer-folioj kiel paĝosignoj. La biblioteko de Věra.

Mi estas en kelo. Estas ĉi ti stakigitaj ĉiuj pakaĵoj, kiujn mi foj-foje sendis. Estas ĉi tie libroj kaj diversaj notoj. Mi trarigardas ilin, specigas ilin. Tion ĉi mi ankoraŭ lasos ĉi tie, tion ĉi mi sendos hejmen, tion ĉi mi kunprenos. Ĝi estas amaseto de leteroj kaj kopioj de poemoj, de meditoj kaj de literaturaj eksperimentoj. Tiujn mi ne komisios al poŝto.

Mi ludas kun la infanoj en ĝardeno. Mi faris por ili pafarkon kaj ŝtonĵetilon. Ni pafas, ni provas trafi la poton, kiun mi starigis sur ŝtonon. Ni konkuras kaj notas al ni streketojn. Kiu malvenkos, tiu formanĝos dum tagmanĝo ĉion, kion li ricevos sur la telero. Mi faras ĉion por malvenki. Francjo ĝojos. Tion, kio estos por tagmanĝo, li ne ŝatas manĝi. Vi senkonscia naiveco, ne ŝati manĝi?

Al sinjorino Lhotská mi rakontas kompatemajn mensogojn, ke ŝajnas al mi, ke Věra fartas pli bone. Post momento oni telefonas al la hospitalo, ke ili tuj venu tien, ke estiĝis sangosputado. La sinjorino estas brava, ŝi retenas larmojn, la sinjoro fabrikulo estas aferema. La gepatroj tuj eksidas en aŭtomobilon kaj

¹ Korespondaĵoj el Germanio el la milita tempo

forveturas en la hospitalon. Mi adiaŭas. Ne, ne estas konvena tempo, por ke mi restu ĉi tie. Mi neniel helpos ĉi tie, mi nur malhelpas.

Ili preparis por mi multajn aĵojn. Pomojn, sukeraĵojn, rumon, kristnaskajn kukojn, sukeron, supojn en kuboj. Ili alportis por mi ĉion ajn. Mi vere estas kiel ilia filo. Kiom malmulte, malmulte valoras la vortoj de mia konsolo. Kaj mi vin iam forlasos, mi iros laŭ mia vojo, vi eĉ ne ĝisvivos mian dankemon, karaj geamikoj.

Mi forveturas, kofrojn plenajn, la avineto akompanas min. Ŝi ploras. Ĉio finiĝas. Adiaŭ, karaj homoj, eĉ vi ne havas facilan vivon.

Transdonu mian saluton al Věra, mi deziras nur ĉion bonan. Kaj denove mi skribos. Sed nun ĉion por savi ŝian vivon. Adiaŭ, bela Prago. Tiom mi antaŭĝojis je vi kaj vi tiom seniluziigis min. Sed laŭ mia konsidero nenion alian mi atendis, kaj tial la seniluziigo eĉ ne doloras. Ĝi dolorigas tiun, kiu atendis multon kaj ricevis nenion.

Trajno alveturos, trajno forveturos.

Mi puŝas min kun la kofroj en la troplenigitan trajnon. Ni estas ĉi tie multaj, la libertempuloj kaj ankaŭ tiuj, kiuj revenas en laborejon kontraŭ sia volo. Multaj el ili travivis multe da timo, se por ili venos ĝendarmo, ĉu oni sendos ilin en edukon labor-tendaron, post kiam ili revenos, kia estos la puno, kaj fine ĉu la tuta timo entute valoris tion. Ekstere lumas la suno, sed en la trajno estas sufoke. En la stacidomo mansalutas nin multaj personoj. El 900 gorĝoj aŭdiĝas la lasta „Saluton“. Adiaŭ. Poste ĉiu sidiĝas, malfermas kofron kaj komencas manĝi.

Ni veturas laŭlonge de la rivero Vultavo. Iuj rigardas kun larĝigitaj okuloj la belecon. Estas eble, ke ni vidas ĝin lastafoje. Kiel kapti kaj konservi ĝin en la memoro? Mi skribas notojn. Nur koncizajn vortojn, pli poste mi prilaboros ilin.

Dormi en la trajno ne estis eble. Unu ekkrias, alia ronkas, tiu leviĝas, jen tiu kuŝiĝas, alia elkliniĝas tra fenestro. Oni kartludas. Libron vi ne vidas. Abunde ili toste trinkas. Ili insultas la vivon. Multaj veturas el libertempo kaj estas tre, tre seniluziigitaj. Tiom ili esperis, tiom pri la libertempo ili revis. Kiom da seniluziigo ili ĝisvivis. Amoj paliĝis, kamaradecoj rompiĝis. Kaj tial fine ili ree parolas pri tio, kiel estis en la Regno. Malantaŭ ni estas blankaj kusenegoj, malantaŭ ni preparitaj tabloj, kvieta nokta firmamento. Kaj tiuj, kiuj iradis sur tapiŝoj, veturigis sin en aŭtoj, kiuj partoprenis drinkadojn, tiuj estas apatiaj plej multe. Sed ili ligis kontaktojn, la gepatroj intensigos penadon, supozeble ili revenos hejmen, supozeble ili sukcesos. Adiaŭ, grandaj revoj, adiaŭ sinjoro profeto. Vi ridinda mondsavanto, kiu ĉe la unua kunpuŝiĝo kun la realo rezignas siajn ideojn kaj planojn. Nur nun vi aprezas ĉiujn, kiuj ion scipovis fari, kiujn iu fidis kaj sekvis ilin, kiuj realigis grandan verkon...

(Esperantigis Jiří Patera)

El poemoj de Eli Urbanová

Sorĉistino

*Okazis antaŭ noktomezo...
Venis fremdul' kun angla naz'...
Mi vendis min... Je kia prezo?
Por fulmmomento de ekstaz'
Nek gren' prosperas,
nek la vino,
sorĉistino!
Ĝis nun ne vidis tian nudon
urbo escepte ekscitita.
Do distru vin! Do pruvu prudon
per kruco hipokrita!*

*Sekvis - sovaĝa amindumo.
Min nur ekregis malkviet',
kiam aperis en lunlumo
hufo anstataŭ la pied'...
Nek gren' prosperas,
nek la vino,
sorĉistino!
Ekzekutist' en poz' konvinka,
tiu ne timas ian sorĉon.
Al bel' vi lernis esti blinda,
jam tempo, kaptu torĉon.*

*Baldaŭ diskuris onidiro,
ke belulinon en kaban'
vizitas stranga kavaliro;
neniu estis ol Satan'.
Nek gren' prosperas,
nek la vino,
sorĉistino!
Jes, satrigardu, scivoluloj,
rapide brulas ligno, paljo!
Nutro tro forta por okuloj.
Viktimon lekas fajro.*

*Ĉu iu - tiel min karesis?
Ĉu iu kisis - kiel li?
Sub tur-men-ti-loj mi konfe-sis
la tu-tan verrr-on kaj eĉ - pli...
Nek gren' prosperas,
nek la vino,
sorĉistino!
Jen adiaŭo... Kaj sen danco.
Jen adiaŭo... Kaj senkante.
Estu damni -! Lasta pranco --
Ŝi falas cindriĝante*

Fenomeno

Eraro, mi ne dormas...

*Mi vidas fiŝojn... Du el ili
deviis de la granda aro
kaj de nun naĝis tra la maro
foje apud si, foje post si...*

*Detalo, kiu min fascinis.
Do, ankaŭ en la oceano
ekzistas io kiel amo...
Foje apud si, foje post si...*

*Kaj ree Jan, ni ambaŭ... Eĉ nin
ne logas hom-amaso. Ĉu ne,
eĉ ni aperas ĉiam kune
foje apud ni, foje post ni...*

*Ni du simile katenitaj
per delikata senta ŝnuro.
Ni fenomeno de l'naturro
foje apud si, foje post si...*

Eraro, mi ne dormas...

Kiam mi versas

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.
Mi antikvaĵo, mi ruin', mi orf',
mi leviĝanta peze el la polv'...
Neniu venas: – Mia kara, ci!
Ah, ravi vin per aliteraci'!*

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.
Jes, hazardema, ekstra personec'.
Mi min disdonas po poem', po pec',
ja ŝatas riski, ŝajnas tia tip',
kun verso ludas kiel nun la zip'...*

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.
Min mem fascinas eble pli dekolt'
de homanimo ol de homa korp'
kaj por momento eble pli ol ĝi
la roz' jetita al mi el loĝi...*

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.
Mi supertrista, nu, ne monaĥin'...
Diru, legant', ke mi delogis vin,
sed nun ne legu, voku je taksi',
en mi tempestas nome la pasi'...*

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.
Kaj ĉio klakis okej, ĉio plej,
en la versejo, hejme, en dormej',
kaj mi matene ĉizis sur la pord',
pluan streketon, tiel, por la ord'...*

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.
Ve, al mi restis tute lasta tul',
sufiĉas movo, unu gesto nur –
stop, Urbanová, fino de striptiz'!
Do intertempe pa, adiaŭ, ĝis...*

*Kaj mi pri amo kaj mi pri la tomb',
kiam versas, estas mi seksbomb'.*

Foto

*Jen mi sen mask' post nokto nigra.
Mi relative freŝa, vigla.*

*Doloro!
Plej frue mi el nigra haro
por ŝanĝ hodiaŭ nodon faros.
Doloro!!*

*Nun mi per kelkaj etaj movoj
al mi nigrigos okulbrovojn.
Doloro!!!*

*Fine mi vestos nigrajn ŝtrumpojn
kaj ĵetos plejdon trans la ŝultrojn.
Doloro!!!!*

*Normale dirus li: – Elinjo,
ci mia nigra ciganinjo!
Doloro!!!!!*

*Li, nigra ŝaf' de l'familio,
ĉar li ne vivis laŭ biblio.
Doloro!!!!!!*

*Mi devas lin ekkisi. Kvankam
nur lian foton nigrablankan.
Doloro!!!!!!!*

*For la fortun'. Sed ankaŭ ĉarmo.
Min morne markis nigra larmo.
Doloro!!!!!!!*

La tunelo Blanka kostas ĉiam malpli ol la ĉiujara funkciado de la Eŭropa parlamento

Tomáš Břicháček

Post multaj jaroj de laboro kaj post ĉiuj peripetioj oni fine baldaŭ inaŭguros la tunelan komplekson Blanka. Kostoj de la konstruo atingos vertiĝodonajn 36,9 miliardojn da kronoj, kio estas je proksimume 10 miliardoj pli ol planite. Kiel estas kutime ĉe niaj transportaj konstruaĵoj kaj ĝenerale publikaj kontraktoj, oni povas supozi, ke teorie ĉio povus esti malpli multekosta, sed tio ne estas temo de tiu-ĉi artikolo. Mi volus nur fari unu interesan komparon, kie la tunelo Blanka servos kiel referenca punkto.

Lasante flanke aliajn konsiderojn, Blanka estas ĉiuokaze monumenta laboraĵo, kiu kun sia amplekso similas al konstruo de kelkaj stacioj de metroo (ekzemple la nova parto de la metrolinio A el Dejvická al Motol koston proksimume 20,2 miliardojn da kronoj). Kun siaj 6,4 kilometroj ĝi estas la plej longa tunela komplekso en la Ĉeĥa respubliko kaj laŭ diversaj fontoj la plej longa urba tunelo en Eŭropo. Ĝia konstruo, kiu inkludis boradon en granda profundeco kaj en malfacila tereno, daŭris sep jarojn. Blanka havas malgraŭ ĉiu negativa reputacio kaj duboj certe iun utilecon; ĝi devus faciligi veturon tra Prago, redukti trafikon en la centro, al multaj aŭtistoj ĝi devus agrabligi ĉiutagan vivon. La giganta komplekso Blanka servu por imagi, kion eblas konstrui por 37 miliardoj da kronoj, eĉ en lando, kiu estas fama pro ekcese multekostaj transportaj konstruaĵoj.

Kaj nun unu malfacila demando: Kiom vi dirus, ke ĉiujare kostas la funkciado de la Eŭropa parlamento? Ekzemple la ĉeĥa parlamento kostas nur fragmenton de Blanka. La Deputita ĉambro havas laŭ la buĝeto por la jaro 2014 planatajn elspezojn de 1,077 miliardo da kronoj kaj enspezojn de 20 milionoj da kronoj. La Senato devus havi laŭ la sama buĝeto elspezojn 522 675 000 kronoj. Funkciado de nia parlamento entute ĉi-jare koston (dekalkulitaj la enspezoj de la Deputita ĉambro) proksimume 1,579 miliardoj da kronoj, tio estas **4,28 %** de la koston de Blanka. Por la prezo de Blanka ĝi do teorie ĉe neŝanĝitaj kondiĉoj funkcius 23 jarojn. Kontraste la funkciado de la Eŭropa parlamento laŭ ĝia ĉi-jara buĝeto kostas **1,756 miliardoj da eŭroj**, kio estas laŭ aktuala kurzo proksimume **48 miliardoj da kronoj aŭ 130 % de la koston de Blanka**. Ĉiuj ĉi miliardoj pro Blanka do ne sufiĉus al ĝi por unu sola jaro de funkciado (nur por kelkaj 9 monatoj).

Do kiel vi vidas, en la Unio la demokratio estas vere *nepagebla*. Aŭ oni ankaŭ povus diri, ke la Eŭropa parlamento estas pli granda *tunelo* ol Blanka. Sed la lumo ĉe la fino ne videblas, do oni eble devus prefere paroli pri nigra truo.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7